# VENEZUELA STELO

Organo de **VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO**

**30-a Jaro = N. 72 = 2-a Semestro 2002**

*ISSN 1316-0451*


## *MILITAJ NUBEGOJ SUPER VENEZUELO*

Eble pro tio, ke mi alkutimiĝis al ĉiutagaj mondaj cirkonstancoj kun konfliktoj kaj militoj en proksimaj kaj malproksimaj landoj kiuj, danke al la tutmondiĝo, preskaŭ situas trans la strato fronte al mia loĝejo, mi neniam antaŭe demandis al mi mem, ĉu unu nuran tagon nia tero konis aktivan pacon. Mi ne havas elementojn por iel respondi al tia demando, sed pesimisme mi emas konkludi per nea respondo.

Estas evidenta ke la kulturoj, la etnoj, la ŝtatoj unuavice zorgas pri siaj individuaj interesoj kaj nur duavice pri la interesoj komunaj. Tamen oni ne devas flankenigi alian realon: eĉ ene de la sama komunumo, la kunvivado estas ege malfacila, ĉar se oni povas indiki per la samaj vokabloj la samajn celojn, ĉiu ĵaluze arogas al si la rajton realigi tiujn celojn per individuaj vojoj, per nekunuzataj iloj, laŭ personaj vidpunktoj.

De post pluraj monatoj nigraj nubegoj ŝvelantaj de konfliktoj kovras per sia minaca ombro nian Venezuelon. La homoj, tradicie trankvilaj, pacaj, demokratiaj, kunlaboremaj, kaj konsistigantaj komunumon sen rasaj problemoj nek klasaj apartigoj, nun konstituas du blokojn, disigitajn per malama linio. Ambaŭflankaj reprezentantoj firme kredas ke ili posedas la veron kaj la pravon, kaj reciproke atribuas al si politikajn sintenojn kaj fiecojn pere de samaj vortoj sed kun evidente malsamaj signifoj. Ili sidas ĉe la sama tablo, meze de kiu troviĝas glaso kun io da akvo. Unu flanko diras, ke la glaso estas duonplena; la alia diras, ke la glaso estas duonmalplena. Imagu ke, ofendocele, iu sanktulo nomumas *sanktulo* iun diablon, kaj ke iu diablo nomumas *diablo* iun sanktulon! Antaŭnelonge la Respubliko Venezuelo, kie oni parolis la hispanan, fariĝis Bolivarana Respubliko Venezuelo. Oni daŭre uzas la hispanan lingvon, sed ŝajnas ke la prestiĝa Hispanlingva Vortaro de la Reĝa Akademio jam ne sufiĉas, kaj oni devus uzi la Hispanlingvan Vortaron de la Bolivarana Akademio. Mi estus tre dankema al kiu povus indiki al mi kie ĝi aĉeteblas.

La solvo al niaj naciaj problemoj nur venos de la interkonsento kaj de la bona volo de la du flankoj kiuj nun interbatalas kaj emas cedi nenion el siaj respektivaj pozicioj. Dio lumigu iliajn mensojn, kaj blovigu venton kapablan forpuŝi, kun la teruraj nuboj, la riskon de sangelverŝa interfrata milito.

Andrés Turrisi

**VENEZUELA STELO**VENEZUELA

Apartado 47675, Caracas 1041 – A
http://www.esperanto-ve.org
http://www.venesperanto.com-1.net
esperanto-en-venezuela@yahoogroups.com

**REDAKCIA KOMISIONO:** Félix García Blázquez, Jorge Mosonyi, Nancy Aquino, Esperanza Pérez, Andrés Turrisi.
ELDONANTO: FUNDAESPERANTO

VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO
Apartado 47675, Caracas 1041 – A
http://www.esperanto-ve.org
http://www.venesperanto.com-1.net
venesperanto@tutopia.com



**ESTRARANOJ:**

PREZIDANTO: Jorge Mosonyi.
VIC-PREZIDANTO: Peter Jaimez.
ĜENERALA SEKRETARIO: Andrés Turrisi
KASISTINO: Esperanza Pérez.
**KOMISIITOJ:**
**BIBLIOTEKO KAJ LIBROSERVO:** Peter Jaimez.
KORESPONDAJ KURSOJ, ELDONADO KAJ PROTOKOLADO, VENEZUELA STELO: **Andrés Turrisi.**
KONSILANTOJ: **Félix García Blázquez, Esteban Mosonyi, Alfredo Portillo.**
HONORAJ MEMBROJ: **Juan E. Bachrich, Fernando De Diego**
ENLANDAJ DELEGITOJ: **Héctor Delgado T. (Mérida), Alfredo Ovalles (Maracay), Germán Montero (Maracaibo), Mayrim Sandoval (Punto Fijo), Jesús R. Cedeño (Maturín kaj Ciudad Bolívar).**
JUNULARAJ AFEROJ: **Mayrim Sandoval.**

ALIĜINTA ASOCIO: ZULIA ESPERANTO-ASOCIO.


**ATENTIGO**

Pri la enhavo de niaj artikoloj respondecas iliaj aŭtoroj.

Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la redakcio.

Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigataj por laŭleĝaj uzoj,kondiĉe ke oni citu la fonton.

Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligus al ni la pliboni-gadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunla-borontojn.

## NACIAJ NOVAĴOJ

Post longdaŭra kaj malfacila gravedeco, kaj kiel rezulto de revoj, komence timidaj ideoj kaj projektoj, sennombraj e-poŝtaj kontaktoj, timoj kaj neraciaj esperoj, fine ni povis okazigi en Karakas, de la 8-a ĝis la 10-a de novembro 2002, la "1-a Venezuela/Kolombia Esperanto-Renkontiĝo".

Rigardante la modestajn atingojn, kun apenaŭ trideko da partoprenintoj, iuj supraĵe povus ripeti la Zamenhofajn vortojn "monto gravediĝis, muso naskiĝis", Tamen ni, konsiderante la politikan kaj ekonomian situacion en ambaŭ landoj, ekstreme delikatan, taksas la eventon sukcesa, precipe el enhava kaj kvalita vidpunktoj. Krom la utileco de la sperto-interŝanĝoj, evidentiĝis la kontentiga lingvonivelo de la samideanoj kolombiaj kaj venezuelaj, kaj la komuna volo puŝi antaŭen la Zamenhofan projekton per kunlaboro kaj interkonsiliĝo.

* * * * * * * * * * * * * * * *

Ĉimomente Venezuelo prezentas maltrankvilan etoson kiu bremsas iun ajn iniciaton kaj agadon, sed ni ne perdas la esperon ke baldaŭ la saĝo regos denove niajn vivojn kaj la helo revenos sur la horizonton. Tiam floros kaj donos fruktojn nia entuziasma agado.

* * * * * * * * * * * * * * * *

Kiel kutime,ankaŭ ĉijare, precize la 6-an de decembro, la venezuelaj esperantistoj okazigis la Zamenhofan Vesperon. La etoso ne estis ideala kiel en antaŭaj jaroj, pro la nacia situacio, tamen ni intencis pruvi ke ni estas kompakta familio, kaj ke almenaŭ inter ni regas frateco kaj unueco kiuj ŝajne malaperis ene de la komunumo ĉirkaŭ ni. Oni atendis kontentigan partoprenon, sed pro ĵusaj bedaŭrindaj okazintaĵoj, lastmomente pluraj samideanoj nuligis sian antaŭe certigitan ĉeeston, ĉar la irado tra la urbo fariĝis malsekura kaj riska. Eĉ tiel, la dudeko da partoprenintoj sukcesis provizore forgesi la eksteran maltrankvilon, kaj pasigis kelkajn horojn en esperplena etoso. La vespero konkludis per interŝanĝo de la kutimaj bondeziroj okaze de la jarfinaj festotagoj kaj la nova jaro.

## INTERNACIAJ NOVAĴOJ

Nova retpoŝtgrupo de UEA starigita: Aktivi-en-UEA! Ĝi estas abonebla per **http://abonu.com/catalog/esperanto.aktive**).

Ĵus estas starigita nova retposhtgrupo de UEA 'Aktivi en UEA!' por faciligi enasocian serĉadon de taskoj, projektoj kaj helpantoj. Aktivi en UEA!-dissendolisto celas disinformi pri taskoj kiuj ankoraŭ ne havas respondeculon. Enskribiĝinte Vi ricevas aŭtomate la taskopriskribojn kaj Vi povas decidi ĉu vi interesiĝas labori por internacia asocio pri interesaj temoj. UEA konsistas el Esperanto-parolantoj kiuj aktivas pri diversaj taskoj. Ĉu ankaŭ vi volas helpi en iu projekto kadre de la UEA-agado? Se jes, Vi povas enskribiĝi en la listo "Aktivi-en-UEA!" per vizito al la retpaĝo **http://abonu.com/catalog/esperanto.aktive** (por starti bv. alklaki aŭ kopii la adreson kaj enmeti ĉe via interretprogramo). Tiamaniere vi estonte aŭtomate ricevos plej freŝe la informojn pri niaj projektoj kaj povas trankvile pripensi en kiu projekto vi emas kunhelpi.

Ankaŭ eblas skribi al **taskoj@uea.org** se vi volas proponi iun alian projekton. Kiam vi skribas pri iu tasko aŭ projekto bonvolu aldoni titolon de la tasko kaj mallongan sinprezenton de vi mem. Kunlaboru: UEA bezonas Vian helpon!

* * * * * * * * * * * * * * * *

Jam haveblas la nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. PIV, referenca vortaro de Esperanto en la tuta mondo, aperinta unuafoje en 1971, estas reeldonita en vesto funde reviziita kaj aktualigita, kun ilustraĵoj enkorpigitaj en la teksto mem. Prezo: 70 eŭro + registrita afranko. Pliaj informoj riceveblas de: SAT, 67 avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio,
satesper@noos.fr, http://www.sat-esperanto.org/

* * * * * * * * * * * * * * * * *

Interesa precipe por la hispanlinvaj esperantistoj: fine eldoniĝos, danke al la Hispana Esperanto-Federacio, la granda vortaro Hispana-Esperanto de Fernando de Diego, longe atendita de la tutmonda esperantistaro. Eblas antaŭmendi la verkon, pri kio responsas <**augustocasquero@infonegocio.com**> (Augusto Casquero, Avenida Burjasot 29, A-31, 46009 VALENCIA, HISPANIO).

Ĉe la pinto de respektinda serio, la 88-a Universala Kongreso de Esperanto okazos ĉijare en Göteborg (Svedio) de 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto.

* * * * * * * * * * * * * * * *

De la 19-a ĝis la 26-a de julio laboros en Lesjøfors (Svedio) la 59-a Internacia Junulara Kongreso. La temo: *Al Libera Kulturo* (ALKO). La aliĝilo elŝuteblas ĉe: **http://www.tejo.org/ijk/2003/**

* * * * * * * * * * * * * * * *

SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) realigos sian 76-an Kongreson en La Chaux-de-Fonds (Svislando) de la 12-a ĝis la 18-a de julio. Interesiĝantoj sin direktu al: Kultura Centro Esperantista, Case Postale 311, CH 2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Telefonnumero: 00 41 032-9267407.

* * * * * * * * * * * * * * * *

Plia grava Esperanto-evento okazos en Svedio en 2003. Temas pri la 36-a ILEI-Konferenco, kiu okazos de la 2-a ĝis la 7-a de julio en Örestrand.

* * * * * * * * * * * * * * * *

Danke al konstanta laboro de kelkaj membroj de la Grupo "Esperanto 10", la franca urbo Sainte Savine (apud Troyes, Departemento Aube) havos novan strato kun la nomo "Zamenhof – Kreinto de Esperanto".

Bonvolu sendi amase gratulmesaĝojn, en la franca aŭ en Esperanto, al: Monsieur le Maire – Hotel de Ville, FR-10300 Sainte Savine, Francio.
Rete : **jean-jacques.arnaud@sainte-savine.fr**

## POR PLI VASTA KOMUNUMO

La Esperanto-asocioj je ĉiuj niveloj laboras por pli bona mondo, por mondo sen lingva kaj kultura diskriminacio, unuvorte ili laboras por "lingva demokratio".

Se vi opinias, ke tiu estas bona celo, vi certe volas subteni ilin. Aliĝante al via loka klubo aŭ al la nacia, faka aŭ monda asocioj (eventuale eĉ al ĉiuj tiuj), vi estos parto de tiu tutmonda Esperanto-movado, kiu de pli ol unu jarcento laboras por homaj lingvaj rajtoj je ĉiuj niveloj, kaj provas konvinki la mondon, ke ankaŭ en la lingva-kultura kampo, justeco valoras pli ol forto.

Samtempe vi eble ŝatas simple esti parto de la komunumo, kiu parolas la internacian lingvon Esperanto. Vi eble ŝatas renkonti aliajn parolantojn de Esperanto, vi ŝatas aĉeti librojn en Esperanto, vi ŝatas vojaĝi al fremdaj landoj kaj koni ties loĝantojn kaj eventuale eĉ esti gastigata de lokaj esperantistoj. Ĉion ĉi la membroj de Esperanto-asocioj faras tute nature, ĉar ili estas daŭre informataj pri la revuoj, la libroj, la kongresoj, la ret-listoj kaj la ret-paĝoj, la korespond-anoncoj kaj la vojaĝ-eblecoj.

Por aranĝi membriĝon, kontaktu vian lokan klubon, vian landan asocion aŭ UEA-n ĉe **<uea@co.uea.org>** aŭ ĉe **www.uea.org**, kiu eventuale povas eĉ provi informi vin pri via loka klubo kaj via landa asocio.

Renato Corsetti
Prezidanto de UEA

# KIAL ESTAS LA ESPERANTO-FONOLOGIO TIEL GRAVA?

Esteban Emilio Mosonyi

Komence ni diru ke la Esperanto-fonologio ne estas iu sistemo tre facila kaj ĝia malfacileco pligrandiĝas por parolantoj de diversaj grandaj kaj malgrandaj lingvoj, inter ili la hispana. La ortografio estas racia kaj ege facila, jes ja, preskaŭ perfekta, sed ortografio ne estas fonologio. Eĉ ni povas aldoni ke la kvin vokaloj – praktike identaj al la hispanaj – estas universale facilaj, kvankam ekzistas lingvoj kiaj la araba kaj la keĉŭa kun nur tri vokaloj; sed tiu certe ne estas la kazo de la konsonantoj, kiuj estas multaj kaj iome komplikaj, kaj ties sistemo respegulas eŭropecajn, ĉefe orienteŭropajn, konsonantarojn.

La situacio komplikiĝas pro la manko de priatento de la plejmulto de la esperantistoj ne troege interesiĝantaj pri fonologio kaj prononcmaniero. Fakte, dum viglas diskutoj pri gramatikaj kaj lingvouzaj eroj, nur malofte ekestas konversacioj pri fonetikaj detaloj. Nia tipa esperantisto normale malhavas prifonologiajn konceptojn kaj vorttrezoron Esperante kaj eĉ nacilingve. Preskaŭ ĉiuj tendencas kredi ke ili prononcas multe pli bone ol ili reale kapablas. Ĉi-tie tamen ni devas enmeti ke sufiĉaj samideanoj de landoj aziaj kaj afrikaj, ankoraŭ novaj por Esperanto, vere klopodas bone prononci pro respekto al la lingvo zamenhofa kaj deziro esti komprenataj tutmonde. Mi partoprenis kunveneton de Azia agado enkadre de la lasta, Fortaleza, Universala Kongreso. Tie mi surprize trovis ke ĉinaj, japanaj kaj aliaj esperantistoj bonege prononcas la lingvon, preskaŭ senakcente en la senco ke ilia elparolo ne rivelis ilian gepatran lingvon. La prononcnivelo de la kubanoj estas ankaŭ sufiĉe alta. Kontraŭe, la tendenco de okcidenteŭropaj samideanoj –germanoj, francoj, angloj, ankaŭ aldone usonanoj – daŭre kutimas esti la forta akĉentumado nacilingveca de perbuŝa Esperanto. En la sama Kongreso mi konstatis ke bonaj parolantoj anglalingvaj kaj germanlingvaj produktadas Esperanton tiel similan fonetike al iliaj nacilingvaj ke multnombraj alilingvaj parolantoj nur malfacile povas kompreni ilin. Tia Esperanto emas esti internacia sed ne internacieca. Bedaŭrinde la nacilingvaj akĉentoj estas des malpli kompreneblaj ju pli flue kaj rapide estas elparolataj far de foje tre spertaj esperantistoj. Tiukaze la veteraneco eble pli ĝenas ol helpas.

Do, por precize kompreni kio okazas en tiuspecaj ĉiam pli oftaj situacioj, ni priekzamenu mallonge la Esperanto-fonologion, specife la konsonantojn, sekvante la tre taŭgan kaj sciencan analizon faritan de la lingvisto kaj eksprezidanto de UEA, John Wells (John Wells, Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto, 1978, paĝo 18).

| | Labialoj | Dentaloj | Palatalalveolaroj (gingivaloj) | Velaroj | Glotalo |
|---|---|---|---|---|---|
| Plozivoj | p b | t d | | k g | |
| Afrikatoj | | ts (c) | tʃ (ĉ) dz (ĝ) | | |
| Frikativoj | f v | s z | ʃ z (ĵ) | x (ĥ) | h |
| Nazaloj | m | n | | | |
| Likvidoj | | l r | | | |
| Duonvokaloj | | | j | w (ŭ) | |
| Vokaloj | | | i | u | Malvastaj |
| | | | e | o | Mezvastaj |
| | | | a | | Vastaj |
| | | | Antaŭaj | Malantaŭaj Rondaj | |

Kiel videble, la transskribo de la Esperanto-fonemoj okazas laŭ la Internacia Fonetika Asocio-sistemo (IPA). Por pli granda facilo de la legantaro ni flankenmetis parenteze la oficialan Esperanto-ortografiaĵon kie necese. Por kiu ajn objektiva persono evidentas ke fonemoj kiaj [ts], [v], [z], [z], [x] estas sufiĉe malfacilaj por hispanlingvanoj kaj foje por aliaj gestudentoj. Ĉiukaze devas esti substrekata la fakto ke la hispana lingvo kunportas ne nur malmultajn fonemojn, sed ankaŭ evitas la por ĝi nekonfortajn konsonant-sinsekvojn. Do, por la meza hispanlingvano ŝajnas tre komplikaj tiaj vortoj kiaj knabo, kvar, strato, kapti, ŝlosilo, advokato kaj tiel plu, krome, kvankam la vorto “observi” supraĵe tre similas al la hispana “observar”, tamen multaj hispanparolantoj plisimpligas aŭ misformigas tiun vorton dirante *okserbar, otserbar,* eĉ *oserbar.* Pro tiaj kialoj mi rekomendas ekde multaj jaroj enmeti en tiuj kazoj etan, neŭtralan, malsonoriĝeman malapereman ŝva-vokalon [ə] por la laŭgrada ellernado de certaj konsonantogrupoj kaj vortfinaj konsonantoj: k$^{ə}$nabo, s$^{ə}$trato, kap$^{ə}$ti, ŝ$^{ə}$losilo, ad$^{ə}$vokato, sep$^{ə}$, ok$^{ə}$, k$^{ə}$vankam$^{ə}$. Ne necesas aldoni ke finfine tiu apogvokaleto oportune malaperos.

Sed en ĉi-tiu tabelo ni observas pliajn koncernajn faktojn krom la relative granda nombro de nefacilaj konsonantoj. Pro strategiaj kialoj ni insistu pri la fonemo /r/. Laŭ la menciita fakverko, la Plena Analiza Gramatiko kaj la interkonsento de la tuta esperantistaro, la denta – aŭ pli precize alveola – kaj vibra prononcado de la /r/ fonemo estas la preferinda sed ankaŭ la varianto uvulara vibra [R] de francoj, germanoj kaj aliaj devas esti plene akceptata, ne nur tolerata. Ekzemploj: [tero] aŭ [teRo], [ruĝa] aŭ [Ruĝa], [Esperanto] aŭ [EspeRanto]. Tiu toleremo estas krome tre necesa, ĉar estas ege malfacile por uzantoj de uvulara [R] ellerni la korektan artikulacion de la prefera alveola varianto [r], kiun uzadas ekzemple hispanparolantoj, kune kun italoj, slavoj, rumanoj, grekoj, hungaroj, finnoj, araboj kaj tiel plu. Aldone menciindas ke la du variantoj – alveola kaj uvulara – estas sufiĉe similaj por ne perturbi la reciprokan interkomprenon.

Sed tiu ne estas la tuta historio. Evidentas ke en la franca lingvo la uvulara [R] estas tre stabila kaj sekve sufiĉe klare artikulaciata kaj aŭdata. Sed en la germana nur la silabkomenca [R] estas plene prononcata dum la silabfina [R] malfortiĝas, ofte malaperas. La situacio

en la angla ŝajnas eĉ pli tikla. La angla /r/fonemo artikulaciatas alveola sed malforta, tio estas malferma, frikativa, eĉ vokaleca; kaj en silabfina kaj vortfina pozicio facile malaperas, precipe en Britio kaj Aŭstralio.

La okcidenteŭropanoj havas alian konatajn prononcproblemojn, el kiuj ni volas citi nur du pliajn sufiĉe gravajn. En la plejmulto de germandevenaj lingvoj la malsonoraj plozivoj /p/, /t/, /k/ multfoje artikulaciatas kun aspiracio, tio estas kun aldonado de sekva [h]sono. Se tiu aspiracio estas malforta ne ekestas problemo; sed se la [h] prononciatas sufiĉe forta, ni ekhavos veran sinsekvon de plozivo kun [h]: thero, phaphero, khisi, anstataŭ tero, papero, kisi. La aspiraciata [t] eĉ transformiĝas en afrikatan /ts/: tsero aŭ ts-hero, anstataŭ tero; thethano aŭ ts-ets-hano anstataŭ tetano.En la samaj lingvoj germanidaj okazas ankaŭ iugrada malsonorigo de la sonoraj plozivoj /b/, /d/, /g/, kiuj eblas soni kiel [p], [t], [k]: peleka anstataŭ belega, taŭri anstataŭ daŭri.

# ALIAJ KONSIDEROJ PRI LA PREDIKATIVA FINAĴO

Félix García Blázquez

La reguloj de la paĝo 232 de PAGE konstituas, el la metodologia vidpunkto, aron da nekoheraj propozicioj, ĉu pro kontraŭdiroj inter kelkaj el ili, ĉu pro enhavi ambiguojn, aŭ simple pro esti nekompletaj. Plie de la internaj kontraŭdiroj, troveblas kontraŭdiroj kun la Fundamento kaj kun la esencoj de la lingvo. Efektive, ni vidu:

Unue por faciligi la analizon necesas malkunmeti la ĉefan regulon, kiu ja estas kondensiĝo de tri reguloj. Jen la triopo:

***I – Kiam la subjekto estas propozicio , la adjektiva predikativo alprenas la adverban-neŭtran finaĵon –e.***

II – Kiam la subjekto estas infinitivo, la adjektiva predikativo alprenas la adverban-neŭtran finaĵon –e.

III – Kiam la subjekto tute ne ekzistas [temas pri senpersonaj verboj] la adjektiva predikativo alprenas la adverban-neŭtran finaĵon –e.

1 – Oni ne bezonas diri ke ankaŭ substantivoj kaj infinitivoj povas funkcii kiel predikativoj. Ekz.:

Leono estas besto – Voli estas povi

Sekve, mankas indiki la koncernajn regulojn.

## <u>Nekompleteco</u>

2 – Aliflanke , kion signifas “adjektiva predikativo”? Ni klopodos kompreni la ideon, komencante per simplaj ekzemploj:

Johano estas inteligenta - Lia fratino estas bela

Ĉiu el ni komprenos ke “inteligenta” kaj “bela” estas adjektivaj predikativoj, t.e. tiuj estas nuraj adjektivoj.

Sed se oni diras ke la adjektiva predikativo (= adjektivo ) ricevas la adverban finaĵon, tio simple estas malobeo al la tria regulo de la fundamenta gramatiko.

## Kontraŭdiro kun la Fundamento

3 – Alia obĵeto al la regulo estas la jena:

Kion signifas ”neŭtra finaĵo” ? Evidente tiu kiu indikas nek masklan nek femalan genron. Do, ne estas neceso paroli pri neŭtra finaĵo , ĉar ĉiuj adverboj estas neŭtraj.

## Nekoncizeco

4 – Rilate al la dua subregulo, validas la samaj argumentoj supre eksponitaj. Plie , en la ofte citita regulo : ”Estas danĝere resti kun leono”, implicite oni akceptas ke la subjekto estas ”resti”, kiam vere, la kompleta subjekto estas ”resti kun leono”.

## Neprecizeco.

5 – Tria subregulo Ekz. ”Hodiaŭ estas varme.”

Almenaŭ oni povas diri ke tiu konstruo ne estas sufiĉe internacia (oni vidu “Venezuela Stelo” N-ro 69 1-a semestro 2001, p. 7)

## Kontraŭdiro al principo de neŭtraleco

6 – En iuj linioj pli malsupre de tiu triobla regulo , la aŭtoro facilanime prezentas la jenan escepton:

”Kompreneble la substantivo povas anstataŭigi la adverban formon”.

## Kontraŭdiro kun la ĉefa regulo

7 – Se la adjektivo estas akompanata de iu adverbo modifanta ĝin, la adjektivo konservas sian finaĵon –a. Ekz. ”Estus tre utila tute precizigi kaj klarigi la rolon de la Oficejo”

## Kontraŭdiro kun la ĉefa regulo.

8 – La verbo ”ŝajni” ne sekvas la kritikitan regulon, malgraŭ ke ĝi estas kopula, t.e. kapabla ricevi predikativon.

## Kontraŭdiro kun la ĉefa regulo

9 - Se oni akceptas la regulojn de PAGE, ĉu vere oni povas aserti ke Esperanto estas facila lingvo? Absolute ne!

## Kontraŭdiro kun la principo de facileco.

10 – Pri ”**la finaĵo –a en la menciitaj kazoj neniam konscie estis uzata en internaciaj esperanto-gazetoj**.”, tio ne estas laŭlogike akceptebla.

## Argumento ”ad ignorantiam”

Mi nur devas aldoni ke en pluraj Esperanto-publikaĵoj oni ekzercas gramatikan cenzuron. Tiurilate interesas informi ke mi verkis plurajn artikolojn por Scienca Revuo kaj ĉiam oni senkonsulte korektis min, en la uzmaniero de la predikativoj.

11 – Oni rajtas pensi ke kelkaj instruistoj suferas pri koncept-eraro, nome: ke Esperanto estas natura lingvo kaj pro tio oni devas imiti la klasikan stilon. Nenio pli erara, ĉar la evoluo de la lingvo , laŭ la antaŭparolo de la Fundamento, devas emi al perfektiĝo, kaj la aldono aŭ impono de esceptoj ne estas alio ol malperfektigo.

## Kontraŭdiro kun la Fundamento kaj kun la Deklaracio pri Esperantismo.

12 - Ni nenion proponas ekster la Fundamento , ni nur aspiras ke oni prenu en konsidero ambaŭn (sic) paralelajn formojn; la nia estas implicita en la gramatiko de la Fundamento.

-----------0----------

En niaj kursoj ni instruas ankaŭ la klasikajn uzmanierojn, nur por ke la lernanto interpretu la koncernajn tekstojn, sen kaŝi nian preferon por la laŭgramatika uzmaniero.

Kaj fine, nia konduto rilate al ĉi tiu problemo estiĝis por la bono de Esperanto, ĉar ekzemple se kelka malamiko de nia lingvo manifestas ke oni mensogas dirante ke Esperanto ne havas esceptojn, kaj mencias la ekzemplojn de la predikativa finaĵo, ni simple respondos ke tiu uzmaniero ne estas deviga , kaj future tre probable triumfos la laŭgramatika , per kio malaperos tiu malperfektiĝo de Esperanto , restante tamen oficiale kiel nura arkaismo.

* * * * *

Noto: La esencaj principoj de la lingvo estas prenitaj el la artikolo ” Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia” de la aŭtoro mem de Esperanto.

**Tre signifan perdon suferis la venezuela Esperanto-movado kiam, la 5-an de oktobro 2002, forpasis en Karakas D-ro Guillermo Alfredo Cook, Honora Membro de la Venezuela Esperanto-Asocio, Membro Fondinto de la Kultura Fondaĵo Esperanto (Fundaesperanto), tradukinto de “Kumeŭaŭa” al la hispana, financinto de la unua eldono de la hispana traduko, kaj klera reprezentanto de la venezuela esperantismo en nia lando kaj eksterlande.**

**La Estraro kaj la membroj de la Venezuela Esperanto-Asocio esprimas sinceran kondolencon al la familianoj de D-ro Cook.**

# 1-a Venezuela/Kolombia Esperanto-Renkontiĝo
## Karakas, 8-10/11/2002

Inter la 8-a kaj la 10-a de novembro 2002 disvolviĝis en Karakas, Venezuelo, la 1-a Venezuela/Kolombia Esperanto-Renkontiĝo.

Kun la efektiva ĉeesto de trideko da aliĝintoj, ne regule akompanataj de pluraj ekstermovadaj interesitoj, precipe la unuan tagon, kiam la programo efektiviĝis nur en la hispana, nia Renkontiĝo plenumis kontentige siajn celojn: kadre de la Esperanto-agado analizi la dulandajn lokajn situaciojn, la malfacilaĵojn, la eblecojn, iniciatojn, atingojn, planojn.

La diversaj prelegoj montris la kontentigan lingvo-nivelon de la prelegintoj kaj indikis sekvindajn vojojn cele al la disvastigado de Esperanto kaj eblajn agadojn por atingi lernontojn por niaj kursoj.

La densa programo ne lasis multe da spaco por distraj eroj, krom la gaja instrua prelego de la juna talenta bogotano Mauricio Cruz, kiu prezentis multajn ŝercajn ecojn de Esperanto-vortoj, la humuraĵoj de la kolombianoj Luis Jorge Santos kaj Luis Alfonso Casas , la interkona vespero en la sidejo de nia Asocio, kaj la jubilea festo per kiu ni celebris la 90-jaran ekziston de la Venezuela Esperanto-Asocio. Ĉi lasta utilis por plibonigi la reciprokan interkonon, kaj forgesigi la laciĝon pro la laboroj kaj la streĉiĝon pro la bedaŭrindaj soci-politikaj cirkonstancoj kiujn travivantas nia Venezuelo de post kelke da tempo.

Ne mankis neantaŭviditaj okazaĵoj, kia la ŝtelado kiun suferis nia estrarano Prof-ro Negrete, kio malebligis ties prezentadon de interesa temo.

La prelegoj de Prof-ro Luis Jorge Santos, el Bogoto, estis modelo de majstra Esperanto-regado kaj de talenta oratorado, kaj prezentis multjarajn spertojn kadre de la lingvo-instruado, kun tre utilaj sugestoj.

Per valora prelego pri lingvistikaj aspektoj de Esperanto en speciala rilato kun nia hispana karakterizo, Prof-ro Esteban Mosonyi, el Karakas, evidentigis la ĝeneralan tendencon al erara prononcado, samtempe indikante eblajn rimedojn por minimumizi kaj eĉ tute forigi tiujn prononc-erarojn.

Tuta surprizo por la venezuelanoj rezultis Rikardo Carrillo, juna sed kapabla esperantisto el Bogoto. Per sia prelego pri “seksumado el okcidenta kaj orienta vidpunktoj”, li pruvis ne nur konkretan regadon de la temo, sed ankaŭ kapablon ĝin prezenti per flua kaj bonega Esperanto.

La evento disvolviĝis en salonoj de la Pedagogia Instituto de Karakas, kies Direktoro respondis pozitive al la valoraj kaj akurataj alpaŝoj de ge-Profesoroj Negrete.

Ni havas la esperon ke nia laborkunveno rezultos fruktodona por sukcesa estonta agado kaj en Venezuelo kaj en Kolombio, kaj ke en ambaŭ landoj la kunlaboro kaj la oftaj kontaktoj estigos la taŭgajn kaj necesajn kondiĉojn por ke Esperanto akiru aŭskulteblan voĉon en nia regiono kaj antaŭ la tuta Esperantujo.

Andrés Turrisi

# POR IU VERSIO DE LA “I CHING”

Tiele l’ onta temp’ nenuligeblas
kiel rigora int’. Neni’ troveblas
escepte de litero neaŭdebla
de la eterna skrib’ nedeĉifrebla,

kies libro estas la temp’. Tiu irinta
for de sia hejmo, estas reveninta.
Estas nia viv’ irota pad’ irita.
La fadenfask’ rigore estas teksita.

Ne timu. Obskuras la sklavokarcero,
la firman vefton faras daŭra fero,
tamen en turno de via izoliĝo

povas troviĝi lumo, iu fendiĝo.
Samkiel sag’ la voj’ fatala estas.
Sed en la fendo, gvate Dio enestas.

Jorge Luis Borges

(Esperantigita de: Andrés Turrisi)

**ABONILO** **(Eltondu aŭ kopiu ĝin)**

Nomo (persono aŭ asocio aŭ gazeto):

___________________________________________________________

Adreso: ____________________________________________________

(1) Mi deziras aboni Venezuelan Stelon por la jaro_________________

kaj sendas:

a) 15 i.r.k.; b) Filatelajn poŝtmarkojn /________/; c) libron kun titolo

___________________________________________________________

(2) Mi deziras ricevi (surface ) Venezuelan Stelon interŝanĝe de la gazeto: _________________________________________ aperanta _____foje jare.


Dato_____________ SUBSKRIBO_____________________

Sendu al: VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO, Apdo. 47675,

CARACAS 1041-A = VENEZUELA

**<esperanto-en-venezuela@yahoogroups.com>**

**<venesperanto@tutopia.com>**



*
**
Sinjoro
Mi volus
Munti en tiuj
ĉi tagoj
Arbon ene de mia
propra koro
Kaj pendigi anstataŭ
Donacoj la nomojn de ĉiuj
Miaj amikoj. Tiuj de proksime
Kaj tiuj de malproksime. Tiuj ĉiamaj
kaj tiuj nunaj.
Tiuj kiujn mi vidas ĉiutage, kaj tiuj kiujn
Tre malofte mi renkontas,
Tiuj ĉiam rememorataj, kaj tiuj kiujn kelkfoje
mi forgesas,
Tiuj konstantaj, kaj tiuj nekonstantaj. Tiuj de la
Horoj malfacilaj, kaj tiuj de la horoj gajaj. Tiuj kiujn
Senintence mi vundis kaj kiuj senintence vundis min.
Tiuj kiujn mi konas profunde, kaj tiuj kiujn apenaŭ mi konas
per ties aspektoj.
Tiuj kiuj al mi ŝuldas, kaj tiuj al kiuj mi multon ŝuldas. Miaj amikoj
Humilaj, kaj miaj amikoj gravaj. Ilin mi nomumas kaj tiujn kiuj trapasis
tra mia vivo.
Unu arbo kun profundaj radikoj por ke ties nomoj neniam estu elradikataj el
Mia koro, kaj kiu florante la venontan jaron portu esperojn, amon kaj pacon, kaj
En via naskiĝtago, Sinjoro, ni povu renkontiĝi por kunpartigi vinberojn de espero,
semante iom da
feliĉo en tiujn kiuj
ĉion jam perdis.
FELIĈAN KRISTNASKON
KAJ PROSPERAN NOVJARON

---

**Remitente/Sendinto:**
**Venezuela Esperanto-Asocio**
**Apartado 47676**
**Caracas 1041-A = VENEZUELA**

**PUBLICACIONES NACIONALES**